

## Scienca eĥo

### Frua homo

Pro kio "neandertalulo"?

La neandertalulo nomiĝas laŭ *Neandertal*. Germanlingva "Tal" estas "valo", do: "valo de Neander". Sed kio estas Neander? Ĉu rivero, ĉu monteto, ĉu iu persono kiu donis sian nomon al tiu loko? Jes, pravas la lasta – temas pri protestanta preĝejkanto-poeto *Joachim Neander* (1650-1680). En la jaro 1674 li fariĝis rektoro de la Latin-Lernejo en *Düsseldorf*, Germanujo, kaj kutimis viziti, vojdirekte al *Elberfeld*, malgrandan valon. La tieaj bizaraj kalkoŝtonaj rokoj, la bunta plantdiverseco kaj la rivereto "*Düssel*" provizis la ĝustan kulison por ekzercado de kanto-arto kaj disvolvado de la poeta talento.

La valo estis baldaŭ konata "lia valo", kaj mallonge post lia frua morto aperis sur mapo la lokonomo *Neandertal*, do *Neander*-valo.

La "kompleta verkaro" de tiu *Joachim Neander* kun liaj poeziaĵoj aperis sub la titolo "*A et O, Joachim Neandri, Glaub- und Liebes-übung*". Sed multe pli konata (kaj ankoraŭ nuntempe en multaj preĝejoj kantata kaj entenata en la repertuaro de ĉiu preĝeja horo) estas la kanto el la jaro 1680 "*Lobe den Herren, den mächtigen König...*" ("Laŭdu ni Dion, la reĝon potencon de l' Tero").

180 jarojn post la "nomado de valo laŭ Neander", iu alia famigis en la tuta mondo tiun familian nomon: la fru-epoka "neandertalulo". (2005-09-15)



### Aldono de salo por boligado

Por boligado de nudeloj kaj terpomoj oni ĉiam aldonas iom da salo en la akvon. Ankaŭ se vi ne scias tion: vi ne faras tion pro la gustosento, sed ĉar la salo plialtigas la bolpunkton de la akvo.

La akvomolekuloj moviĝas dum varmegigado daŭre pli rapide kaj la salo malakcelas tiun ĉi procezon. Pro tio la akvo nur pli malofte forvaporigas, do transe de 100° gradoj laŭ Celsius. Kaj en tiu pli alttemperatura varmego viaj terpomoj kaj nudeloj pli rapide estos finkuiritaj. Do, vi nun scias kion vi faras... (2005-03-03)



Kial?

### Skalpado – sanga kutimo en "Sovaĝa Okcidento"

Kiu respondecis?

Ne la indianoj – sed la "triboj" de britoj kaj francoj. La registaroj de ambaŭ landoj pagis, komence de la 18-a jarcento, al sia-landanoj premiojn por la mortigo de setluloj de la respektiva "alia nacio". Kiel sola pruvo oni postulis la prezentadon de koncerna skalpo. (2005-03-01)



### Francujo – songolando de la frandemuloj

Kial oni en Francujo tiom impertinent-bone manĝas? Nu, tio estas danke al la Franca Revolucio. Ĝi kaŭzis (kune kun la fino de la "*Ancien Régime*" = "malnova reĝimo") la ruiniĝon de la grandaj kastelaj kuirejoj de la diboĉa nobelaro, kiu antaŭe vivis en abundo kaj manĝoĝuo.

Ekde nun la majorio de la altege kvalifikitaj por-nobelaj kuirejoj, kutimiĝintaj al la traktado de la plej bonaj specoj de manĝomaterialoj, estis vole-nevole devigitaj sin dungigi ĉe la burĝaro, la nova reganta civitanaro.

Tiu tute alimaniere ŝanĝo de la vivo kaŭzis la multefikan disvastiĝon de la "altnivela nobelara kuirarto". Multaj de la regintklasaj artismuloj malfermis restoraciojn. (2005-09-12)



### Silueto – leksika lingvoampleksigo pro maliceco

*Étienne de Silhouette* (1709-1767) estis Ministro pri Financoj sub la franclanda reĝo Ludoviko la XV-a kaj ekstreme neŝatata pro siaj rigoraj ekonomiigaj planoj, kiuj akre limigis la privilegiojn de la franca nobelaro.

Por mem esti imitinda ekzemplo, la ministro forigis en sia kastelo la oleopentraĵojn kaj anstataŭigis ilin per mempretigitaj tondaĵoj. Responde al tio la nobela aristokrataro provis ridindigi lin per tio, ke ili ĉion malmultekostan – do ankaŭ la desegnaĵojn, kiuj "prezentis nur la konturojn" – nomis "*à la Silhouette*". Tio estis la ekesto de nia hodiaŭa termino "silueto". (2005-09-09)

